# EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024: 33; septembro 2.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: sen.Sume 390 KB

## Sukceso en Burundo

Mi havis la honoron esti akceptita de la Ministro, s-ino Imelde Sabushimike, kiu okupiĝas pri la Ministerio de Nacia Solidareco, Sociaj Aferoj, Homaj Rajtoj kaj Genro. Dum nia renkontiĝo mi parolis pri Esperanto kaj ĝia efiko en la komunumo. La ministro ricevis mian mesaĝon kaj petis, ke ni organizu Esperanto-trejnadon por la instruistoj de la lernejo, kiu traktas la indiĝenajn Twa-ojn en Burundo. Estas sukceso, kiun gajnis ANEB por la instruado de Esperanto en la komunumo de niaj indiĝenaj popoloj. Tio permesos al Esperanto fariĝi lingvo de edukado en Burundo.

**Manirakiza Aime Patrick**

## Franclingvaj kursoj en Kongo DR

La kurso okazos en la franca kaj komenciĝos la 15-an de septembro 2024. Estos tri grupoj en vacapo: veraj komencantoj, mezaj komencantoj kaj progresantaj komencantoj. La instruado okazos per vacapo individue pere de sendo de lecionoj kun hejmtaskoj. La kurso estas senpaga. Entute estos 100 lecionoj kaj 10 testoj (skribaj ekzamenoj) Du voĉaj ekzamenoj okazos en februaro kaj julio kaj tiam okazos la livero de atestiloj fare de ILEI. Estas eble ricevi diplomon de la Universitato Espoir (UEC) de Baraka laŭ aparta interkonsento.

***UEC-lingvo-fakultato@groups.io***

Françoise NOIREAU (Fransoazo) en vacapo + 33 609 120 374 aŭ desirdapprendre@gmail.com'

## La forgesita virino – filmo el Afriko

https://www.youtube.com/watch?v=FBQIXzF0oSw: sekvu la rakonton de Johana, juna virino forlasita de sia fianĉo. Al ŝi mankas rimedoj por vivteni sin kaj sian infanon. Alfrontante la malfacilaĵojn de la vivo, ŝi faros renkonton, kiu helpos al ŝi fine eskapi sian malfacilan situacion. La filmon verkis kaj produktis Dankon Kwibe laŭ propono de Ulrich Matthias. En ĝi rolludis la edzino Mapendo Kigangu kaj aliaj esperantistoj de Burundo. *La forlasita virino* estas la 3-a filmo realigita de Dankon Kwibe, post *La Venĝemo* (2019); *La Heredaĵo* (2021).

## Nova afrika lando - Gambio

Hodiaŭ mi partoprenis en la unua kunsido kun junuloj de Gambio, kiuj ŝatus eklerni Esperanton. Ili volas fondi landan asocion. Ili partoprenos en la unua reta kurso kiun mi gvidos dufoje semajne. Inter miaj gelernatoj estas: *Miss Travel* Niĝerio, *Miss Travel* Tanzanio, *Miss Travel* Kenjo, famaj personecoj kiuj povos helpi al disvastigo

de  Esperanto en Afriko. Dankon al ILEI kaj al la prezidanto de ILEI (Ahmad) kiuj disponigis senpagan ligilon (*Zoom*) por instrui.

**Manirakiza Aime Patrick**

## Sumoo septembre sinriĉige




La 8-an de septembro, komenciĝos la 89-a Internacia Esperanto-Sumoo por du semajnoj. Dum tiu tempo ni, la partoprenantoj, ĉiun tagon legos la libron, kiujn ni elektis, kaj kvanton da paĝoj, kiun ni mem decidas, kun 300 esperantistoj tra la mondo. En la solidara cirkonstanco ni povas ĝui legadon de Esperanto-libroj. Tiu sumoo estas la plej granda leg-movado en la homa historio, danke al Esperanto kaj interreto. Por partopreni, bezonata estas informoj pri:

1. Viaj vera nomo, sumoo-nomo, urbo, lando, retadreso
2. Titolo de legota libro kaj legotaj paĝoj dum unu tago

Pli detale vizitu nian retejon: http://www.esperanto-sumoo.pl/

**HORI Jasuo;** Retadreso: hori-zonto@r.water.sannet.ne.jp

## Distanc-lernado por hispanlingvanoj

La Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (Universidad Nacional de Educación a Distancia, UNED) pere de sia Centro pri Lingvoj anoncis la baldaŭan malfermon de la enskribiĝo por la venonta universitata jaro, inkluzive de la kurso de Esperanto en la niveloj A2 kaj B1. La enskribiĝo malfermiĝas la 5-an de septembro kaj finiĝos la 22-an de oktobro. Ni memorigas ke la anoj de la Hispana Eo-Federacio ĝuas tre altiran rabaton en la kosto de la enskribiĝo.

## Septembra simfonio

Je la 22-a de septembro okazos la la Internacia Tago de Paco de UN. vidu la ĉi-kunan proponata afiŝo de la reprezentantoj de UEA en Novjorko. Tradukojn al viaj lingvoj bonvolu sendi al mi aŭ al <unesperante@gmail.com> .




Je la 26-a  la Eŭropa Tago de Lingvoj, kies temo estas ĉi-jare *Lingvoj por paco.* EEU decidis kunigi la du datojn kaj pretigi ĉi tiun deklaron, kiun oni uzu tiuokaze. Se vi loĝas en unu el la EU-landoj, bonvolu traduki ĝin al via lingvo por informaj celoj kaj sendi ĝin al mi aŭ al Luigi

Fraccaroli, sekretario de EEU, luigi.fraccaroli@esperanto.it. Tradukoj jam ekzistas por la angla, ĉina, dana, franca, germana, hispana, hungara, norvega, portugala slovaka kaj sveda.

## Posteĥoj de la UK en Tanzanio

En la freŝdata numero de *The Arusha News*, unu el la plej legataj aruŝaj ĉiusemajnaj gazetoj, aperis en la angla lingvo longa interjvuo de Costa Mashauri pri la kongreso kaj Esperanto. La tuta interparolo, kiu legeblas ĉe https://www.esperanto-afriko.org/2024/08/26/mallevigis-la-kurtenoj-de-la-109-a-uk-gazetoj-refoje-raportas-pri-gi-kaj-esperanto/, Tradukis membroj de la Esperanto-Klubo de Lomeo, nome Mélonkou Djésco kaj Adjévi Adjé, por pli vasta esperantista publiko. La originala teksto legeblas en la cifereca gazeto de *Saturday, August 24 – Friday, August 30, 2024* ĉe la paĝoj 8 kaj 9.

Michela Lipari, ; http://www.mulkin.info

## El la Kongresa Rezolucio

La kongresanoj konstatas kun kontento, ke la svahila lingvo funkcias kiel supernacia lingvo, kiu ebligas kontaktojn inter loĝantoj de pluraj ŝtatoj en la Orient-Afrika Komunumo (OAK) sen bezono uzi lingvon de iamaj koloniaj imperioj. Ankaŭ ĉiuj aliaj afrikaj lingvoj meritas subtenon kaj necesas agnoski la lingvajn rajtojn de ties parolantoj, aparte en baza edukado, en akordo kun la rekomendoj de Unesko. Tio estas bazo por paco, por pli bona mondo.

Humphrey Tonkin

## Amerika agado rilatu kun OAŜ

Estis diskutite en la 109-a UK dum la kunsido de la Amerika Komisiono, ke UEA proksimiĝu al OAŜ (Organizo de Amerikaj Ŝtatoj), kie multe da organizoj de la civila socio jam estas. Interkonsente kun la komisionestro kaj nia kolego en la Komitato, Guy Matte, mi devos subteni tion. Estas eblo, ke UEA formale registriĝu kiel organizo de la civila socio en OAŜ. Tamen unue indas videbligi nian subtenon al la agado de OAŜ. Unua movo estas la suba invito, kiu okazis en la dissendolisto <amerika-komisiono-de-uea@googlegroups.com>.

Temas pri invito de la Amerika Komisiono de UEA al akompano de la Regula Kunsido de la Konstanta Konsilio de OAŜ por pripensi la Manifeston kontraŭ Malriĉeco en Ameriko - ĉiujn detalojn vi trovas en la Eventa Servo de UEA: https://eventaservo.org/e/OAS20240822

Aliaj tiaj informoj devos veni en la menciita listo de la komisiono. Do, se iu inter-esiĝas plu aktuale informiĝi pri tiu temo, tiu bonvenas aliĝi al la listo. Ssendu tutblankan mesaĝon al <amerika-komisiono-de-uea+subscribe@googlegroups.com>. Mi aparte kuraĝigas komitatanojn kaj observantojn el amerikaj landoj aliĝi. Via subteno estas grava al ni. Mi dankas al Guy Matte pro lia kunordigo de la komisiona agado.

Fernando Maia Jr., **Universala Esperanto-Asocio |** Vicprezidanto

**Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj**

**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj**

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**La unuaj tridek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn, kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.